

Sceno 1 (Bonvolo-hejmo)

KARLO: ...ok, naŭ, dek, mi ĵonglas... dek unu, dek du, dek tri, mi ĵong... be! Sed mi ĵonglis... jes! Mi ĵonglis! Be! Kie ĝi estas, la ŝafo? Jen la ŝafo, la stulta ŝafo.

RUSELO: Ĝi ne estas stulta ŝafo, ĝi estas inteligenta ŝafo... tre inteligenta ŝafo.

KARLO: Be! Ŝafoj ne estas inteligentaj. Ili estas stultaj, absurdaj.

RUSELO: Atletoj ne estas inteligentaj. Ili estas stultaj, absurdaj. Ili kuras.

KARLO: Jes, kaj ili ĵonglas.

RUSELO: Ho, kia bela, ruĝa pomo! Dankon!

KARLO: Kaj ili manĝas. Mm... kia bela ruĝa pomo! Sed la ruĝa pomo ne estas por vi. Ĝi estas por atleto – mi!

RUSELO: Ho, ve! Kio estas tio? Ĉu estas akcidento? Ĉu estas incendio? Ĉu estas katastrofo?

KARLO: Idioto! Ne estas akcidento, incendio, katastrofo! Sonas vek-horloĝoj.

RUSELO: Vek-horloĝoj ... ?

KARLO: Jen vek-horloĝo! Ĉu ne ekzistas vek-horloĝoj en Nov-Zelando?

RUSELO: Kompreneble ekzistas vek-horloĝoj en Nov-Zelando. Sed vek-horloĝoj estas stultaj.

GEORGO: Kioma horo estas?

FILISA: Kioma horo estas?

JOLANDA: Kioma horo estas?

GEORGO: Terure! Estas la sesa!

FILISA: Ne, ne, Georgo! Ne estas la sesa! Estas la sepa!

JOLANDA: Ne, ne, Panjo! Ne estas la sepa! Estas la oka!

KARLO: Be! Ne estas la sesa! Ne estas la sepa! Ne estas la oka! Estas...

RUSELO: Estas... estas la sepa kaj duono!

KARLO: Kio?

RUSELO: Kompreneble estas la sepa kaj duono. Mia ŝafo diris. Ĝi estas tre inteligenta ŝafo.

KARLO: Ŝafo! Be!

RUSELO: Vek-horloĝoj estas stultaj.

GEORGO: Jes! Vek-horloĝoj estas stultaj. Mia ne funkcias. Kia stulta vek-horloĝo!

FILISA: Jes! Vek-horloĝoj estas idiotaj. Ankaŭ mia ne funkcias. Kia idiota vek-horloĝo!

JOLANDA: Jes. Vek-horloĝoj estas absurdaj. Ankaŭ mia ne funkcias. Kia absurda vek-horloĝo!

KARLO: Ne! Vek-horloĝoj ne estas stultaj, idiotaj kaj absurdaj. Ili estas tre bonaj. Kaj mia vek-horloĝo bone funkcias. Kia bona vek-horloĝo!

RUSELO: Ankaŭ mia ŝafo bone funkcias. Kia inteligenta ŝaf-horloĝo!

KARLO: Ŝafo! Be!

GEORGO: Sed, kie estas Helena?

RUSELO: Helena, ho!

GEORGO: Ĉu ŝi dormas, en la lito? Estas la oka kaj duono!

FILISA: Filozofoj! La sepa kaj duono, kara... la sepa kaj duono!

KARLO: Mia fratino ne dormas.

RUSELO: Do, ĉu ŝi laboras... en la informejo?

KARLO: Ne! Ŝi ne laboras en la informejo! Ŝi laboras en nia ĝardeno, jen!

Sceno 2 (Ĝardeno)

HELENA: Saluton! Jes, mi laboras! Mi laboras en nia ĝardeno, nia bela ĝardeno. Kaj mi skulptas! Mi skulptas!

Sceno 3 (Bonvolo-hejmo)

KARLO: Be! Kaj mi kuros! Mi kuros al la urbo... al la parko!

RUSELO: Ho! Pardonon! Kio estas parko? Mi ne komprenas.

FILISA: Ho, parko! Parko estas ejo kun arboj kaj floroj. Ejo kun grandaj arboj. Ejo kun belaj floroj.

RUSELO: Bone! Dankon, Filisa! Nun mi komprenas.

KARLO: Do, mi kuros al la urbo, al la parko. Mi kuras. Ĝis la revido! Ĝis!

GEORGO/FILISA/JOLANDA: Ĝis la revido!

GEORGO: Nu, Brus...

JOLANDA: Paĉjo! Li ne estas Bruselo. Bruselo estas urbo – urbo en Belgio. Ĝi estas granda urbo en Eŭropo. Kaj li ne estas granda urbo. Li estas ŝafisto. Kaj lia nomo estas...

RUSELO: Ruselo kun Ro, sinjoro. Ne Bruselo kun Bo!

GEORGO: Pardonon, pardonon, Ruselo! Ve! Mi forgesis! Mi forgesis!

FILISA: Filozofoj! Ili ofte, ofte forgesas. Pardonon, Ruselo!

GEORGO: Sed, Ruselo! Ĉu vi bone dormis, en via dormosako? Kun via kap-kuseno... via ŝafo?

RUSELO: Ho, dankon, Georgo! Mi tre bone dormis. Ŝafistoĝ tre bone dormas. Kaj hieraŭ mi estis laca.

FILISA: Kaj ĉu via ŝafo bone dormis? Via kap-kusena ŝafo? Ho, jes, ĝi bone dormis!

Sceno 4 (Ĝardeno)

RUSELO: Saluton, Helena!

HELENA: Ho, saluton, Ruselo!

HELENA/RUSELO: Kiel vi fartas... ?

Bone, dankon. Kaj vi... ?

Ĉu vi bone dormis ... ?

RUSELO: Dankon, Helena. Mi bone dormis. Kaj vi?

HELENA: Dankon ... tre bone.

RUSELO: Sed... kia bela skulptaĵo! Vi estas bona skulptisto, Helena!

HELENA: Dankon, Ruselo.

RUSELO: Ĝi estas tre bela. Sed... kio ĝi estas?

HELENA: Kio ĝi estas? Nu...

RUSELO: Ĉu ĝi estas sinjoro... aŭ sinjorino?

HELENA: Ne, ne.

RUSELO: Ĉu ĝi estas filozofo... aŭ dancisto... aŭ atleto?

HELENA: Ne, ne.

RUSELO: Do, ĉu ĝi estas skulptisto?

HELENA: Ne, ne.

RUSELO: Do... kio ĝi estas?

HELENA: Mi ne scias.

RUSELO: Kio? Ĉu vi forgesis?

HELENA: Ne! Mi ne forgesis. Mi simple ne scias. Ne gravas, kio ĝi estas. Ĝi estas abstrakta.

RUSELO: Abstrakta? Sed... ĝia nomo! Kio estas ĝia nomo?

HELENA: Ĝia nomo estas...

FLORA: Ho, ve! Ho, ve!

HELENA: Jen ĝia nomo: Ho, ve! Jen bela nomo por abstrakta skulptaĵo.

FLORA: Ve! Ho, ve! Terure! Katastrofe!

HELENA: Kio estas? S-ino Bundo!

FLORA: Mi svenas! Mi falas! Mi mortas!

RUSELO: Ho, ne! Vi ne mortas! Mi tenas... mi tenas!

FLORA: Ho, dankon, sinjoro... dankon!

FILISA: Jen vi estas, s-ino Bundo.

FLORA: Ve... ho, katastrofe!

GEORGO: Ĉu vi ne bone dormis, s-ino Bundo?

FLORA: Kompreneble mi ne bone dormis! Kompreneble, ne! Terura lito... terura kap-kuseno... terura lit-kovrilo!

HELENA/RUSELO: Terure!

FLORA: Kaj mia brak-horloĝo ne funkcias. Kia stulta brak-horloĝo! Kioma horo...?

GEORGO: Estas... estas... kie estas mia brak-horloĝo? Kie ĝi estas?

RUSELO: Pardonon! Georgo... jen!

FLORA: Ho! Mi svenas! Mi falas! Mi mortas!

GEORGO: Kio? ho, ho!

RUSELO: Estas la naŭa! Ne... Estas la naŭa kaj kvarono.

FLORA: La naŭa kaj kvarono! Ve! Mia vendejo! Mia kara vendejo!

RUSELO: Vendejo? Helena... vendejo! Kio ĝi estas?

HELENA: Vendejo? Do ejo, kie oni vendas. Jen vendejo.

RUSELO: Kompreneble! Vend-ejo! Dankon!

FLORA: Ve! Ve... vendejo! Mia kara vendejo! Sed mi iros... mi iros al mia vendejo... sed ho, katastrofe! Katastrofe!

GEORGO: Kio... kio estas pri via vendejo, kara sinjorino? Ĉu estis akcidento... incendio?

FLORA: Jes! Ne! Ho, terure!

FILISA: Georgo iros kun vi al via vendejo.

GEORGO: Kiu? Mi? Sed... kara!

FILISA: Jes! Georgo iros kun vi. Kaj survoje vi parolos al li pri via vendejo.

FLORA: Ho, bone! Jes!

GEORGO: Sed...

FLORA: Jes! Survoje mi diros al vi pri mia katastrofa vendejo. Do... ek, sinjoro! Ek al la vendejo!

RUSELO: Mi svenas! Mi falas! Mi mortas!

Sceno 5 (Ekster la informejo)

KEN: Nu, kioma horo estas? Ho! Estas la naŭa... la naŭa kaj tri kvaronoj. Kio? La naŭa kaj tri kvaronoj? Bone! Do, ek al la informejo! Sed, ve! Kiu tago estas hodiaŭ? Ĉu hieraŭ estis sabato? Aŭ ĉu hieraŭ estis dimanĉo? Ne, vi estas stulta, Ken! Hieraŭ estis lundo. Hodiaŭ estas mardo, kaj morgaŭ estos merkredo. Do, mardo. Kaj la informejo... la informejo estas malfermita lunde, merkredo kaj vendrede. Kaj hodiaŭ estas mardo. Kaj la informejo... ve! Ĝi estas fermita! Fermita! Do nun, ek al la vendejoj!

Sceno 6 (Vendejo)

FLORA: Jen!

GEORGO: Nu, jes... katastrofa la vendejo. Nun mi komprenas, s-ino Bundo.

FLORA: Mia nomo estas Flora.

GEORGO: Ho, jes... Flora. Sed, pri la vendejo...

FLORA: Kaj vi estas Georgo.

GEORGO: Jes! Sed... pri la vendejo...

FLORA: La vendejo! Terure! La fakturoj! Jen, Georgo, jen! La fakturoj! Jen unua fakturo... okdek steloj! Jen dua fakturo... cent steloj! Jen tria fakturo... ducent tridek steloj! Jen kvara fakturo... kvarcent sesdek steloj! Kaj jen kvina fakturo, sepcent dudek steloj! Kvin fakturoj, kaj... ho, ve! Mi estas sen mono, sen steloj! La vendejo, ĝi estos fermita!

GEORGO: Fermita?

FLORA: Jes, fermita! Mi ne laboros. Mia vendejo ne funkcios! Mi estos sen vendejo! Ho, la stultaj fakturoj! Georgo! Nu, kliento! Kliento! Saluton, sinjoro!

KEN: Saluton, sinjorino!

FLORA: Fraŭlino, sinjoro! Sed, ne gravas!

GEORGO: S-ino Bundo... Flora... mi iros...

FLORA: Vi restos, kaj vi vidos! Vi vidos! Nu, sinjoro... Ho! Jes! Kia bela kolĉeno!

KEN: Jes, ĝi estas bela.

FLORA: Ĝi venis el Afriko, de esperantistoj en Afriko. Ĝi estas afrika kolĉeno.

KEN: Ho! Afrika kolĉeno! Ĝi estas ĉarma. Sed...

FLORA: Kiom ĝi kostas? Ĝi kostas naŭdek naŭ stelojn. Ĝi ne estas multekosta.

KEN: Ne, ne estas multekosta. Sed...

FLORA: Sed... ho! Kia bela bildo!

KEN: Jes, ĝi estas bela.

FLORA: Ĝi venis el Eŭropo, de esperantistoj en Eŭropo. Ĝi estas eŭropa bildo.

KEN: Ho! Eŭropa bildo! Ĝi estas bela.

FLORA: Sed... kiom ĝi kostas? Ĝi kostas ducent naŭdek naŭ stelojn. Ho, sinjoro, tio ne estas multekosta. Kaj ĝi estas ĉarma bildo. Sed, ho! Kiaj belaj brak-horloĝoj! Kaj ne tro multekostaj!

KEN: Jes, jes, mi komprenas. Dankon, sinjorino... dankon! Mi rapidas... rapidas! Ĝis... ĝis la revido!

FLORA: Jen! Ĉu vi vidis? Jen la problemo! Miaj klientoj rapidas el la vendejo! La kolĉenoj... la bildoj... tro multekostaj! Ho, ve!

Sceno 7 (Bonvolo-hejmo)

KARLO: ...dek ok, dek naŭ, dudek, dudek unu, dudek du, dudek tri! Mi ŝvitas!

JOLANDA: Kaj mi legas. Ŝŝŝ!

FILISA: Saluton, Karlo. Vi terure ŝvitas. Jen akvo por vi.

KARLO: Akvo? Ho, dankon, Panjo, dankon. Mi trinkos. Mmm, kaj kia bela, flava banano! Mi manĝas, mi manĝas...

FILISA: Nu, kiu laboros morgaŭ en la informejo Bonvolo? Hodiaŭ estas mardo, kaj la informejo estas fermita. Sed morgaŭ estas merkredo... Kaj lunde, merkrede kaj vendrede oni laboras en la informejo. Morgaŭ la informejo ne estos fermita. Do, kiu laboros tie?

KARLO: Nu, Panjo, kompreneble! Helena laboros morgaŭ en la informejo.

FILISA: Ne, ne, Karlo. Via fratino ne laboros morgaŭ en la informejo. Ŝi laboris tie hieraŭ. Ĉu vi forgesis?

KARLO: Be! Do, Jolanda laboros morgaŭ en la informejo.

JOLANDA: Mi ne laboros morgaŭ en la informejo. Morgaŭ mi laboros en la juĝejo. Hodiaŭ mi legas. Do, ŝŝŝ!

KARLO: Nu, ĉu vi laboros morgaŭ en la informejo, Panjo?

FILISA: Ne, ne, Karlo! Morgaŭ mi dancos. Mi dancos. Kaj mi ankaŭ laboros en la domo. Do ĉu vi, Karlo... ĉu vi laboros morgaŭ en la informejo?

KARLO: Kiu? Ĉu mi? Be! Mi estas atleto. Mi kuros, mi rapide kuros! Kaj atletoj ne kuras en informoj!

FILISA: Karlo...

KARLO: Atletoj kuras en urboj, en parkoj, en kurejoj... kaj ili ĵonglas... Jes! Ili ĵonglas, unu, du, tri...

RUSELO: Jes! Atletoj ĵonglas! Kaj ŝafistoj manĝas. Kia bela, ruĝa pomo! Dankon, Karlo!

KARLO: Be! Hej! Vi...

FILISA: Do, kiu iros morgaŭ al la informejo? Kiu? Do, kompreneble! Mi scias! Georgo iros. Georgo!

Sceno 8 (Bonvolo-hejmo)

GEORGO: Nu... nulo, nulo, nulo, nulo kaj nulo estas... nulo! Ho, facile! Kia bona matematikisto mi estas! Kaj ok kaj nulo estas ok. Kaj ok kaj tri estas... estas dek unu. Dek unu kaj ses estas... dek sep. Ho, facile! Kaj dek sep kaj du estas... ho, facile... estas dek...

RUSELO: Saluton, Georgo!

GEORGO: A! He! Kio...? Ho, mi kalkulis, Ruselo. Mi kalkulis! Kaj nun... ho, ve! Ĉu dek? Ĉu dek unu... dek sep...? Mi forgesis!

RUSELO: Aŭ ĉu dek naŭ? Sed pardonon, Georgo. Mia ŝafo estas bona matematikisto... tre bona kalkulisto. Momenton. Mil kvincent naŭdek. Facile! Ho, dankon, ŝafo!

GEORGO: Mil kvincent naŭdek... ho, jes! Ho, dankon, ŝafo! Vi rapide kaj bone kalkulis. Sed, ho! Mil kvincent naŭdek steloj! Ho, ve!

RUSELO: Kia granda monsumo!

GEORGO: Terure granda...

RUSELO: Sed, kio pri la mil kvincent naŭdek steloj? Kio estas? A! He! Kio? Ho, ne gravas, Brus... Ruselo. Ne gravas!

Sceno 9 (Bonvolo-hejmo)

GEORGO: Mi pensas. Mi paŝas. Mi paŝas... kaj pensas. La filozofo pensas. Kia granda problemo... mil kvincent naŭdek steloj! Sed por bona kaj inteligenta filozofo, ne ekzistas problemo! Ne! La filozofo paŝis kaj pensis kaj nun, la filozofo scias! Facile! Por bona kaj inteligenta filozofo... facile! Kaj nun... rapide! Ek!

Sceno 10 (Ĝardeno)

HELENA: Pardonon, Ruselo. Mi ne iros kun vi. Mi laboras... mia laboro tre gravas.

RUSELO: Do, mi iros al la urbo sen vi. Mi iros kun mia ŝafo.

HELENA: La Esperanto-vendejo de s-ino Bundo estas tre ĉarma, Ruselo. La vendejo estas en la urbo.

RUSELO: Do, mi iros al la vendejo de s-ino Bundo. Dankon, Helena. Ĝis la revido!

Sceno 11 (Vendejo)

GEORGO: Jen, Flora... jen via mono! Por la fakturoj.

FLORA: Ho, Georgo... Georgo...

GEORGO: Mi kalkulas. Jen kvincent steloj... jen mil... mil cent... mil ducent... mil tricent... mil kvarcent... mil kvincent steloj.

FLORA: Ho, Georgo!

GEORGO: Kaj nu kvincent kvindek... sepdek... naŭdek! Jen via mono. Mil kvincent naŭdek steloj. Kaj la Esperanto-vendejo ne estos fermita!

FLORA: Ho, Georgo! Dankon! Dankon! Hura! La vendejo ne estos fermita!

RUSELO: Ho, ne, kara ŝafo! Ne!